

# Nova provo

Organo de NOVO, Asocio por Komuna Ellaborado de Lingvo Internacia  
Numero 4 Februaro 1993

*Preskaŭ ĉiu membro de Novo resendis la unuan voĉdonilon, kaj ni nun povas kontroli la rezultojn ĉe paĝoj 30 kaj 31 de tiu ĉi numero. Eble estas tro frue por konkludi, sed ŝajnas ke ni eble devos rezigni pri atingo de unuanima interkonsento, ne nur pri tuta lingvoprojekto sed eĉ pri ĉiu unuopa demando. Tio ne devas tro malkuraĝigi nin, ĉar restas la perfekte legitima celo de ĜENERALA interkonsento (jesoj je du trionoj, tri kvaronoj aŭ pli da voĉdonantoj), kion ni estas jam atingintaj ĉe kelkaj demandoj.*

*Kompreneble, ajna linio metita por difini kiu estas aŭ ne estas ĝenerale interkonsentita propono estus arbitra. Ni tial eble devos postnoti ĉiun proponon kiu gajnas plimulton, por minimumigi la ĝenon de tia arbitreco. Sekve de tio, ni rimarkas ke simplan plimulton (11 ĝis 14 el eblaj 21 jesoj) gajnis proponoj 1, 2, 13, 14, 16 kaj 42. Tio estas, plimulto el ni kredas ke Esperanto devas esti pli facila kaj pli internacia, ke ne estu multaj ŝanĝoj sed nur la strikte necesaj, ke la reformlaboro estu laŭŝtupa kun komenco pri alfabeto, ke estu regula struktura bazo por la ellaborado de fakaj terminoj, kaj ke estu la litero y kun la sono de la nuna j.*

*Signife pli sukcesaj, tamen – tiel ke ni ja rajtas pretendi jaman interkonsenton pri ili – estis proponoj 4, 17 kaj 33 (ĉiuj kun 16 aŭ 17 el eblaj 21 jesoj). Ni ĝenerale interkonsentas, do, ke:*

*1) La bazo de la reformo estu la nuna Esperanto. Nete malakceptita (kun nur 3 jesoj) estis propono 50 pri “tute nova planlingvo” – plia konfirmo ke la ĝenerala volo estas plibonigi Esperanton, kaj ne krei ion tute alian.*

*2) La alfabeto konsistu el nur la 26 sensupersignaj literoj de la latina alfabeto. Signife, tiu ĉi estis la nura propono pri kiu neniu voĉdonanto sindetenis. Ĉiu ja havas opinionon, kaj la opinio de preskaŭ ĉiuj estas kontraŭsupersigna.*

*3) La asocio Novo laŭeble fariĝu aliĝinta aŭ kunlaboranta asocio ĉe UEA. Ni ne volas, do, krei skismon aŭ apartiĝi de la centra Esperanto-organizaĵo, sed kontraŭe kontribui al ĝi, aldonaĵe ion kion ni taksas inda – eventuale eĉ nepra – je inkluzivo.*

*Konforme kun la prioritato donata al alfabeto kaj kun la interkonsento ĉe proponoj 4 kaj 17, la voĉdonilo akompananta tiun ĉi numeron – kiun precipe ellaboris kaj proponis nia s-ro Navareño – traktas nur la alfabetan demandon. Aliaj demandoj, provizore neglektataj, prenos sian vicon poste; do, ne estu maltrankvila se via(j) propono(j) ankoraŭ ne aperas.*

*Reage al la deziro starigi kunlaboran rilaton kun UEA, indas rimarki ke Novo jam havas sufiĉe da membroj por esti konsiderata por oficialiĝo kiel fakasocio de UEA. Nia aliĝpeto do povus esti prezentita al la Estraro kaj Komitato de UEA jam ĉi-jare. Se iu membro volas helpi prilabori kontrakton de kunlaboro kun UEA kaj/aŭ prezenti ĝin ĉe la Universala Kongreso en Valencio, tiu komuniku tion al la roterdama adreso.*

*Fine, estos rimarkate ke tiu ĉi enkonduka paĝo aperas denove en normala Esperanto. Tio ŝuldiĝas grandparte al kritiko, ke la redaktoro “volas nur prezenti propran sistemon”. Kvankam estis fakte alie ol tiel, por eviti tiun ŝajnon ĉiuj redaktaj komentoj estos de nun en normala Esperanto, laborlingvo de Novo kaj bazo de la ellaborata reformo.*

## *Esperanto, nuntempo, reformoj kaj la nova koncepto*

Nia idealo estas Esperanto, la bona, neutrala, facila, internacia komunikilo. Ĉefe la politika premo en la lastaj jardekoj malhelpadis la bonan evoluon de nia lingvo. Estis kaj estas ankoraŭ la espero, ke jam per reformoj eblas sukcesigi nian lingvon, sed montriĝas, ke tio ne sufiĉas. Tiaj klopodoj ne povas movigi la tuton.

Esperanto fariĝis en la longa tempo ekde ĝia naskiĝo vivanta lingvo disvastigita tra la tuta mondo, sed la adeptoj estas ankoraŭ tre, tre maldense semitaj. Iom pli da sukceso estus kuraĝiga. Ni agu kaj esperu!

La tempo neniam haltas. Ankaŭ la naciaj lingvoj en la daŭro de la jaroj pro internaciaj komunikadoj ŝanĝiĝis kaj alprenis fremd-vortojn. Rapide enŝteliĝis vortetoj kiel: *bit, fit, in, fun* ktp. Plej grava por ni estas adapti nian lingvon al la naturscienca evoluo de la lastaj jardekoj.

Por ke Esperanto estu plene integrita en la nuntempa vivo kaj havu ĉiujn kvalitojn por esti alloga kaj sukcesa, necesas, ke ni:

1) klopodu por alloga, bela, moderna, praktika kaj te'nika vortprovizo;

2) diskutu dezirindajn gramatikajn plibonigojn, kiuj estas interesaj;

3) alstrebu la eldonon de modelaj fakinstrulibretoj, kiuj donas al ni en laborejo kaj oficejo la eblecon esperantlingve interpreti la ĉiutagajn te'nikajn kaj sciencajn temojn, pri komputiloj, pri elektronikaj direktiloj de maŝinoj, pri la diversaj aparatoj kaj agregatoj.

*Grava:* Por akiri aktualan vortprovizon kaj modelan faklingvon taugas tradukoj de, ekz.: interesaj anoncoj, uzinformoj de medikamentoj, instruiloj pri la uzado de komputiloj, kaj instrukcioj de maŝinoj. Tiel iom post iom perfektiga la fakscio kaj la faklingvo, kio estas utila por ĉiuj, donas novan ŝancon al nia lingvo kaj samtempe la eblecon elprovi reformetojn. Abonebla revuo dediĉata al tiaj studoj, multaj helpemaj gesamideanoj, kaj vigla varbado gvidus Esperanton al bona celo.

Kaj jen la proponoj jam ofte diskutitaj. Ili estas tiom bonaj kaj utilaj, kiom ili povas helpi al la sukceso de Esperanto.

1.0) Apud la oficiala aboco estu fonetika alfabeto vicigita laŭ hindia modelo: unue la vokaloj kaj poste la konsonantoj sen supersignoj kaj ligitaj al *e* au *o* por bone distingi inter similsonaj konsonantoj.

*a, e, i, je, o, (ø=ö), u, (w=ü), be, po, ve, fo, de, dye (ĝ), to, ce, txo au ĉo (ĉ), ge, ko, he, qo ('), le, ro, me, no, ze, so, ye (j), xo (ŝ).*

*Klarigo:* Ĉar *u* post vokalo en silabo jam estas mallonga, supersigno ne utilas. Por fari la fonetikan alfabeton ankoraŭ pli universala oni envicigu la vokalojn *w (ü)* kaj *ø (ö)* por sen supersignoj indiki la elparolon de fremdvorto. Cetere, la elparolo de *q* similas jam al *'* kaj la ĉina *x* al *ŝ* kaj, nur por diri, la kroata *Đ, đ* al *ĝ*.

2.0) *Gramatiko.* En la angla lingvo la adjektivo ne kunfaras la kaz- kaj la plural-fleksion de la substantivo, kaj la turka lingvo ne uzas la plural-formon de la substantivo, se nombro jam indikas la pluralon. Tiuj faktoj estas argumentoj limigi ankaŭ la uzadon de la akuzativo al vere utilaj kazoj: por personaj pronomoj, por indiki direkton, kaj por doni al vorto apartan akcenton. Tio faciligus la ortografion.

Ankaŭ por indiki la sumon de devizoj, por mezuroj kaj pezaj, la gramatikaj finaĵoj parte au tute ne estas utilaj. Sufiĉas skribi: 5 Dolar, 10 ECU (ekü), 7 metro, 100 Volt, 1000 Ohm, 12 tor aerpremo ktp. Pli racia!

2.1) Nefacila reformcelo estas anstataŭigi la pluralfinaĵon de la substantivo *-oj* per unu litero. Ido anstataŭigis ĝin per *-i*, sed tio ne eblas, ĉar ĝi indikas jam la E-infinitivon de la verbo. Se *ø (ö)* kaj *w (ü)* estus E-vokaloj, oni povus per unu el ambaŭ anstataŭigi *-oj*.

2.2) La korelativa sistemo estas bona; ankaŭ en kelkaj naciaj lingvoj oni ekkonas similaĵojn. La vortoj kiel ekz. *tiujn kiujn* aspektas iom pezaj. Oni povus iom mallongigi kaj anstataŭ *kiu* skribi *ki* (sama sono kaj senco kiel la franca *qui*) kaj en la pluralo *kw (kü)*. Do, anstataŭ "tiuj floroj, kiujn vi vidas", oni povus diri "tw florø, kwn vi vidas". Ø oni povas tie rigardi kiel interligaĵo de *o* kaj *j* (*ø [ö] = oj*).

3.0) Vortoj kaj frazoj. Preferoj: bela, klara, preciza kaj konciza.

3.1) Pli belaj kaj taugaj vortoj estus ekz. (parte el Ido): *sivo* (kribrilo), *hano* (krano), *gambo* (kruro), *konti* (kalkuli), *posto* (poŝto).

Dezirinda estus bonegaj Esperanto-vortoj anstataŭ la altruditaj anglaj vortoj transprenitaj de naciaj lingvoj: *okay = en-o* (en ordo); *know-how = sci-kiel* ktp. ktp.

3.2) *Mal-vortoj: malbona, malsana, malafabla, malĝoja* . . . estas tute en ordo, sed vortoj uzataj en la te'niko kaj scienco bezonas apartajn nomojn, ekz. *kurta* (mallonga), *ofa* au *aperta* (malfermita), *sinistra* (maldekstra).

3.3) Pli alloga en frazeto povas esti verboj en prezenco sen la finaĵo *-as*, ekz.: Mi dezir ludi. Ĉu vi vol vidi? Mi est preta. Mi hav donacon! Mallongaj vortoj kaj frazetoj estas sugestivaj kaj ŝatataj de la junularo.

*Resumo:* Antau 100 jaroj la vivo estis ankoraŭ tre modesta kaj simpla. Nun por la sukceso de Esperanto plej gravas, adapti nian instruadon al la bezonoj de la nuna tempo. La Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino faras sian eblon. Bona afero! Granda helpo en niaj klopodoj! Se ni ekzamenas bonajn proponojn, bonvenigas interesajn iniciativojn, laboras kaj varbadas per ĉiuj rimedoj por nia bona celo, ni estos sur la bona vojo.

Ni instigu la verkadon de instrulibretoj pri ĉiuj temoj de la moderna vivo: te'niko, komerco, trafiko, korespondado. Tradukoj de interesaj anoncoj, uzinformoj, instrukcioj de komputiloj, maŝinoj, aparatoj ktp. estas bona bazo por elabori facilan precizan, faklingvon kaj por ricevi aktualan vortprovizon. Tiaj laboroj estas ankaŭ la bona elirbazo por verki serion da faklibretoj. Tio mankas ankoraŭ al ni. Ili faciligos al ĉiuj interesuloj skribi efikajn, modelajn, bonstilajn informojn, leterojn, disertaciojn.

Moderna aranĝo kaj freŝa lingvo instigas lerni kaj uzi Esperanton!

**Walter Kobelt (Svisio)**

### *Proponos por Novo*

1) Lingvo havan du uzos: 1) por esprimo di pensado, e 2) por komunikado. Nenia nacia lingvo estas facile lernebla. Eĉen se la mondo uzan angla kiel interlingvo la bezono por regula, logika sistemo kiel instrumento di pensado kontinuuon ekzisten.

2) Oni devan konduken nur strikte necesa reformos en la reformo di Esperanto. Tiel akcepto di la nova sistemo estas pli facila. Unue oni devan difinen: a) la alfabeto (kun aboliso dil super-signos), e b) la struktura vortos. Tiam povan sekven necesa chanjos en la vortaro p.e. aboliso del mal-vortos ed enkonduko di nova vortos p.e. *puel* anstataŭ *knabino*.

3) Signifo di vorto dependan de la kunteksto. Me pledan por adopto di gramatikala libereso. Oni devan uzan dezincenos nur kie necesa au por signifo au por eufonio.

4) Me kredan das nov entuziasmo sekvon la reformo.

**Thomas Wood**

### NOVAJ MEMBROJ

Robert Alberg, 12 Kraus St., Tel-Aviv, Israelo

J. S. Brilleaud, 7, Rue des Frères Lumière, F-92500 Rueil, Francio

René De Clerck, Pastoor Vandenhoudtstraat 13, B-2950 Kapellen, Belgio

Tony Kelly, Cân y Lloer, Ffarmers, Llanwrda, Dyfed, Kimrio

Claude Martins, B.P. 152, F-59053 Roubaix cedex 1, Francio

Asher Mizrahi, Israelo (pseŭdonimo, same kiel Luiz Galindo en la unua membrolisto, NP 3)

K. Riemersma, Postbus 10284, NL-1001 EG Amsterdam, Nederlando (antaŭe observanto)

Heinrich Ringli, Holestrasse 119, CH-4054 Basel, Svisio

Bert Schumann, 9, square Charles Richet, F-91000 Evry, Francio

Thomas Wood, 4 Cherry Walk, Cheadle Hulme, Cheadle, Cheshire SK8 7DY, Britio (antaŭe observanto)

### PATRONO

Walter Kobelt, Landquartstr. 81b, CH-9320 Arbon, Svisio (antaŭe observanto)

### ADRES-ŜANĜOJ

Heinz Platzer, Erdbergstrasse 72/19, A-1030 Wien, Aŭstrio (observanto)

Mario L. Ruiz Karell, Apartado 14012, Marianaao 14, C. Habana 11 400, Kubo

Joachim Werdin, Skrytka 147, PL-47-220 Kaździerzyn, Pollando

*La nova kategorio "Patrono" estas por simpatiantoj kiuj volas subteni la asocion alie ol per propra membriĝo. En la kazo de s-ro Kobelt, pro kiu la kategorio estis kreita, temas pri pago de kotizo por ne-transpagipova membro. Ĉar Novo nepre volas bonvenigi triamondanojn, tia subteno estas tre aprezata. Por esprimi tiun aprezon kaj kuraĝigi al aliaj simile helpi, ni akceptas aperigi kontribuadojn de patronoj en tiu ĉi kaj estontaj numeroj de NOVA PROVO.*

## Antawen!

Kiel vi vidac, mi skribac en Esperanto (Fazo Du) kiu awdeble ectac idente cama kun Fazo Unu, ced ne ckribe – tsefe por eviti cupercignoy. Fazo Tri ne ectac preta kay versayne neniam ectos, kay mi tial arogac al mi la privilegion steli por la (klare kontrafundamenta) Fazo Tri la pli brilayn ideoyn de la aliy proyektoy, tsar ili ne ectac kopiraytay!

Rilate, do, al padjo unu de la tria numero de *Nova provo*, mi konctatac, ke verbay finajoy per *-n* (anctataw *-s*) ectac en Hindo-Ewropa kuntekcto tute akcepteblay. Bedawrinde, tamen, ili probable deviguc forigon de la akuzativo, tsar *-n* ectac ankaw la pley versayne elektota litero por tiu netcecajo (almenaw por pronomoy law mi). Parenteze, kiel la romianoy toleric kay la angloy ancoraw tolerac *-m* (*him, whom, them*) mi neniam kapabloc kompreni. Ets en mia propra lingvo ectac rectajoy de tio.

Ankaw la aliy ideoy cur padjo unu ectac cerioze ctudinday. Anctataw la proponitan prefikson *nol-* (= *mal-*) mi preferuc *dec-* (*des-*) aw *on-*.

La artikoleto de *c-ro Navareño* iom curprizic min, tsar li neglektac unu printcipon kiu saynac al mi neprajo, nome: unu cono = unu litero (kay unu litero = unu cono!). Kay tsu la cono *z* tute malaperac el lia lingvo – aw eble ectac loce intersandjeble kun *c* (*s*)? Povac ecti, ke li devac ancoraw repoluri cian projekton. Ced li faric unu tre interecan rimarkon, pri la malfatcila djuncta elparolo de *kv* kiu (en la praktiko) elfalac kiel *kf* aw *gv*. Mia colvo estuc *kw* kiun elektic ankaw aliy.

*C-ro Monja* vane klopodoc malinventi telefonoy ktp, ced ya farac validan rimarkon pri la akuzativo kaj djia dezirinetco por liberigi vortordon kay liveri bonayn tradukoy. Mia opinie oni povuc colvi la problemon de eraroy farante djian uzon *fakultativa* same kiel dji ectac, mi kredac, en Ido. Oni tiel retenac liberan vortordon. Cimilan printcipon oni eble povuc apliki al aliy erarigay elementoy de Esperanto, nome difini, ke oni *rajtac* por klareto ced *ne devac* apliki iun regulon. Tiurilate mi pencac pri la reflekciva adyektivio *cia* kaj pri la por multay malfatcilay prepozitcioy *da* kaj *po*. Mi kredac, ke ce la lingvo devac ecti fatcile lernebla *kay senhonte uzebla* dji devac malhavi kaptiloyn de tiu cpetco.

Antawen kun la laboro!

Luiz Galindo

## Pri seksismo

Grava aspekto de Esperanto, kiu indas esti reformata jis nun ne estis menciita en la pajoy de *Nova Provo*. Estas bedaurinde, ke Esperanto estas rigardata kiel seksisma nun de multay homoy, precipe juste tiuy, kiuy estus alie allogatay de la ideo de internacia lingvo. Ili citas la afiksoidon *-in-*, kay la mankon de simila maskla afiksoido. Ili opinie tio traktas inoy kiel subordigitan specon de viro.

Estas facile kompreni, ke ji okazis, char la ina situacio en 1878-1887 estis multe diferenca de hodiau. Sed tio respondo ne sufichas. Ankau estas sencele kontraui, ke la saman problemon frontas inoy en etnay lingvoy, kay ke la liberigo de inoy estas politika, kay ne lingva, lukto. Por tiay ancorau-eksteruloy, ne gravas ke Esperanto havas centyaran literaturan historion, ke centmiloy da homoy yam lernis jin kia ji estas, kay ke por centoy da homoy nia lingvo estas heredita, gepatra lingvo.

Iuy opinias, ke estas la respondeco de esperantistoy forigi tiun reakcian anakronismon. Lau Zamenhof, Esperanto estas la proprazho de la mondo. Do, ili naive kredas, ke Esperanto povas esti shanjata. Eble mi ankau estas naiva.

Same aplikijas che la vortprovizo. Preskau chie la radikoy estas nepre de maskla derivado. Ni chiuy scias, kiom evidenta estas tiu fakto, sed yen la du pley gravay ekzemploj:

*viro – virino*  
*patro – patrino*

Ech Volapuko alyujis ambau seksoyn egalraytey en tiuy kazoy:

*man – vom*  
*fat – mot*

Bedaurinde ji originale ankau havis seksisman inan afiksoidon (*ji*, elp. ‘shi’), kay samkiel Esperanto ne ankau masklan afiksoidon, do *frato/fratino* estis *blod/ji-blod, hundo/hundino* estis *dog/ji-dog*, ktp. Interese, kiam Volapuko estis reviziata en 1929 de Arie de Jong, li enkondukis kontrau-seksismayn reformoy. Ido havas masklan afiksoidon *-ul-*, sed mi opinias, ke tiu shanjo kausus pli da malfacilazhoy ol tio, kion mi proponos.

Kiom difektijus la lernebleco de la lingvo, havi kelkayn novayn radikoy, ekz. *femino, matro, sororo*, ktp.? Ni yam faris la samon kun la *mal-* vortoy, originale poezie, sed nun pli kay pli en la kutima lingvo. (Mi opinias tamen, ke

*des-* estus pli bona afiksazho ol *mal-* au *nol-*.) La radikoj *feminism-* kaj *feminist-* yam estas jenereale agnoskitaj kiel akcepteblaj radikoj. Oni certe ne aŭdacus paroli nuntempe pri *virinismo*, do kial plu uzi la vorton *virino*? La vorto *ino* estas pli kaj pli uzata anstataŭ *virino* penante esti neseksisma, sed ĵia signifo estas pli larĝa ol tiu de *virino*, ĵi ne estas ekvivalenta.

Ni ankau bezonas forigi la nocion, ke la ega plimulto de vortoj, kiuj aludas al homoj, estas masklaj. Plia uzado de *ge-*, au enkonduko de *ge-* en la singularon estus peza, kaj ne tute forigus la seksismon. Do, *dentisto*, k.e., ne estu plu *viro*, kiu kuracas dentojn, sed *homo*. Same che partikipay terminazhoy. *Amato* estu viro au femino.

Por intenca maskla terminazho *-iĉ-* estis iam proponata de Bak Giwan analogie al la karesay terminazhoy *-ĉjo* kaj *-njo*. Do kiam estas nepre necese indiki masklan genron, oni dirus *dentisticho*, *amaticho*, ktp.

Pri personaj pronomoj, oni devus minimume agnoski *lishi*, au pli bone, *sbili*, kiel genre neutran pronomon de la tria persono. La radikoj *shil-* yam ekzistas kiel medicina termino, sed tio povus esti shanjita en *kbil-*, kio estus chia-okaze pli rekonebla internacie.

Estas multaj aliaj konsiderendazhoy en la afero, che kiuj mi ne certas pri la justa solvo. Kion ni faru pri *sinyoro/sinyorino*, pri la afiksoido *ge-* en *gefratoy* ktp., kaj pri iuj aliaj seksismaj elementoy en nia vortprovizo, ekz. *knabino*, *avino*, *onklino*, *filino*, *ili*? Sugestoy estus bonvenaj.

Ed Robertson

### *Simpligu Zamenhofa*

Ŝanĝoj en lingvo ne povas esti surmetita el supra. Vi imagu ke kiel ekzemplo en Anglio kelka profesoroj konsilas la registaro ŝanĝi la pluralo del substantivoy. Ili ĉiu havos *-s*. Do: *mouses* anstataŭ *mice*. Tio komprenebla estas nepensebla. Eĉ se la regulo signifas plibonigo.

Tiel sama devas esti nepensebla ke kelka eminenta esperantistoj konsilas la Akademio anstataŭigi *-oj* per *-i*. Ŝanĝoj devas deveni el la *praktiko*. Kiu estas la deziroj del ordinara esperantistoj? Ili devas decidi.

Regulo de Zamenhof feliĉa garantias ke tio okazas. Ĝi postulas ke post enkonduko de ŝanĝo, la malnova formo restas. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formo malnova (Antaŭparolo de la Fundamento).

La ordinara esperantistoj do havas la lasta vorto.

Ni ne sistema ekzamenu Esperanto por eltrovi kie plibonigoj estus ebla. Ni esploru kie *en la praktiko* malfacilaĵoj okazas.

Mi venas al la sekvanta vico da formoj kiu estas neoportuna.

- |                                 |  |
|---------------------------------|--|
| 1. <i>-iĝ</i>                   | <i>onto</i>  |
| 2. <i>sia</i>                   | 11. <i>u</i> -formo post <i>por ke, deziri</i> kaj simila        |
| 3. <i>po</i>                    | 12. diferenco adjektivo-adverbo (superflua lau Zamenhof en 1894) |
| 4. <i>ŭ</i>                     | 13. akordo substantivo-adjektivo / pronomo (sama)                |
| 5. <i>ĉi tiu</i>                | 14. akuzativo <i>-n</i> (sama)                                   |
| 6. <i>da / de</i>               |  |
| 7. dato                         |  |
| 8. vortoj kiel <i>miaopinie</i> |  |
| 9. <i>de la</i>                 |  |
| 10. <i>-into / -anto / -</i>    |  |

### Solvoj

- troviĝi* → *sin trovi*  
*sidiĝi* → *eksidi*  
*fondiĝi* → *esti fondita/ata*  
*komenciĝi/komenci* → *komenci*
  - Post 1492 la indianoj perdis ilia libero.
  - Ĉiu el ni varbis tri nova anoj.
  - ŭ* → *u*
  - ĉi tiu* → *ĉi*
  - nombro da / nombro de* → *nombro da*
  - 23a aprilo 1992 au 23-4-92
  - miaopinie* → *lau mia opinio*  
*ĉiuokaze* → *en ĉiu okazo*  
*ĉi-jare* → *ĉi jaro* (vidu 5)  
*vespere* → *en la vespero*
  - de la* → *del*
  - parolinto / parolanto / parolonto* → *parolanto*
  - Ni deziras ke vi venas.
  - Ŝi laboras rapida.
  - kaj 14. Ni vizitos nia bona amikoj.
- Ebla ankau:
- ŝanĝi* (malfacila prononcebla) → *altri*
  - Retorno al atismo. Por multa esperantistoj itismo sin montras tro malfacila.
- Ĉiu ĉi aliigoj faras Esperanto ega pli oportuna. Tamen la tekstbildo iĝas alia nur tre malmulta. Sama kiel la parolata lingvo.
- La proponoj del alia partoprenantoj ŝajnas al mi en la plej granda parto nesana. Ili tro ŝanĝus la lingvo. La malnova skribaĵoj ne plu estus sufiĉa legebla. Kroma la proponita ŝanĝoj *ne estas necesa*. La esperantistaro – feliĉa – neniam akceptos ilin.

K. Riemersma (Nederlando)

Rezultoj de la unua voĉdono

1. pli facila	+	0	-	+	0	-	+	+	+	+	+	-	+	+	+	+	0	-	+	+	+	+	14
2. pli internacia	+	+	0	+	+	-	+	+	+	-	0	+	+	-	+	+	-	-	+	+	0	13	
3. eŭrop-similaj korelativoj	+	0	-	0	0	-	-	+	0	-	0	-	0	-	0	+	-	-	0	+	0	4	
4. bazo nuna Esperanto	+	+	+	+	0	+	0	+	+	+	+	+	+	+	+	+	+	0	-	+	+	17	
5. akuz. nur ĉe pronomoj	+	+	-	0	0	+	0	-	-	0	0	-	+	-	0	-	-	-	0	0	-	4	
6. -a finaĵo anstataŭ -e	+	0	+	-	0	-	0	-	+	0	-	0	+	-	0	-	0	-	+	0	+	6	
7. kurtigo de frazoj	+	-	-	0	0	-	0	-	-	0	0	-	-	-	0	-	-	-	-	-	+	2	
8. Alberg-pronomoj	+	+	-	0	0	-	-	-	-	-	0	0	-	-	-	-	0	-	+	0	-	3	
9. <i>mol-</i> anstataŭ <i>mal-</i>	+	+	-	0	0	-	-	-	+	0	-	-	-	-	-	-	0	0	-	-	3		
10. pliordigita vorttrezoro	+	+	-	0	0	-	-	-	+	-	0	-	0	+	-	-	0	-	+	0	0	5	
11. supersigno nur por ĝ	+	-	0	-	0	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	1	
12. ĵ-sono al j	+	+	-	+	0	-	-	-	+	+	-	-	-	-	-	-	+	-	+	-	+	8	
13. nur necesaj ŝanĝoj	-	0	+	0	0	+	0	+	0	0	+	-	+	+	+	+	+	0	-	+	+	11	
14. laŭstupa laboro	-	+	0	-	0	+	+	+	0	+	+	-	0	+	0	+	+	-	+	+	+	12	
15. hoismo	-	+	+	-	0	-	-	+	-	-	-	-	-	0	-	-	-	-	-	-	-	3	
16. regula bazo por terminoj	-	+	0	+	0	+	+	+	+	+	+	0	-	+	-	-	+	-	+	+	-	12	
17. sensupersigna alfabeto	-	+	+	+	+	-	+	-	+	+	+	+	-	+	+	-	+	+	+	+	+	16	
18. Dao-alfabeto	-	-	-	-	0	-	-	-	-	-	0	0	-	-	-	-	-	-	-	-	0	0	
19. latinidaj radikoj	-	-	-	-	0	-	-	-	0	-	-	-	-	-	-	-	-	-	0	-	0	0	
20. <i>ai, ei, oi, ui, au, eu</i>	-	-	-	-	0	-	-	-	-	0	-	0	0	-	0	-	+	-	-	0	-	1	
21. forigo de la akuzativo	-	0	-	-	0	-	-	-	0	0	0	-	-	-	-	+	-	-	+	0	+	3	
22. adjektivoj sen -n kaj -j	0	-	-	-	0	-	+	-	-	-	-	-	+	-	-	-	-	-	+	0	+	4	
23. Universala Skribo	-	+	0	-	0	+	-	0	-	-	-	+	-	-	-	+	-	-	-	-	-	4	
24. Galindo-alfabeto	-	0	0	+	0	-	-	-	-	-	0	0	-	-	-	-	-	-	0	-	1	1	
25. Galindo-literonomoj	-	-	-	+	0	+	-	-	+	-	+	0	+	+	+	-	+	0	-	0	0	8	
<b>Membroj</b>	Alberg	Alves Pinto	De Clerck	Galindo	Goeres	Halvelik	Kelly	Martins	McCoy	Mizrahi	Navareño	Nobel	Riemersma	Ringli	Robertson	Ruiz Karell	Schumann	Stahl	V. van Themaat	Werdin	Wood	SUMO JESJOJ	
+	= <i>jes</i>																						
-	= <i>ne</i>																						
0	= <i>sindeteno</i>																						

26. naciaj variaĵoj de <i>c</i> kaj <i>s</i>	-	-	0	-	0	-	-	-	-	-	-	+	-	-	-	-	0	-	-	-	1	
27. <i>x</i> anst. <i>h</i> post konsonantoj	-	-	-	0	-	-	-	-	-	-	+	-	-	0	-	-	+	-	+	-	3	
28. alternativa akuz. prep. <i>an</i>	-	-	0	-	0	0	+	-	-	+	-	0	-	-	+	-	0	+	-	0	-	4
29. multaj neologismoj	-	+	0	-	+	+	-	+	-	-	-	+	-	+	0	-	-	+	0	-	0	7
30. alfabeto principo de UNA	-	+	0	+	0	+	0	0	0	-	-	-	-	+	0	+	+	-	+	0	-	7
31. <i>-s</i> pluralo, <i>-n</i> verboj, akuz. <i>a</i>	-	+	-	+	0	-	-	-	+	+	0	-	-	-	-	-	-	-	-	-	+	5
32. <i>k</i> -sono al <i>c</i> , <i>'</i> -sono al <i>k</i>	-	-	-	0	-	-	-	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	1
33. kunlabora rilato kun UEA	+	+	+	0	0	+	+	+	+	+	+	0	+	+	+	+	+	+	-	+	+	17
34. Navareño-alfabeto	-	-	-	0	-	-	-	-	-	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	1
35. evito de neologismoj	-	-	0	-	0	-	+	-	+	+	+	-	-	-	-	+	0	-	-	0	-	5
36. Monĵa-alfabeto	-	-	-	0	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	0
37. uzo de <i>ja</i> por emfazo	-	-	-	0	-	0	-	+	0	0	-	-	-	0	-	+	0	+	0	0	0	3
38. sufikso <i>-ial</i>	-	-	-	-	+	-	0	-	-	0	0	0	-	-	+	-	-	-	-	0	-	2
39. dividstreko allasebla	+	0	0	0	0	+	0	-	+	0	0	+	-	+	+	-	+	0	+	0	+	9
40. <i>ch</i> , <i>kh</i> , <i>sh</i> , <i>zh</i>	-	-	+	-	0	-	-	+	0	-	-	-	-	+	+	-	-	-	-	-	-	4
41. ĝ-sono al <i>j</i>	-	-	-	0	-	+	-	0	-	-	0	-	+	+	-	-	-	-	-	-	-	3
42. <i>j</i> -sono al <i>y</i>	+	+	-	+	0	-	+	-	+	+	-	-	-	+	+	-	+	-	+	-	+	11
43. <i>w/u</i> anstataŭ <i>ŭ</i>	-	+	-	-	+	+	-	-	+	-	+	0	-	-	+	-	+	-	+	-	+	9
44. aldono de <i>y</i> al <i>a</i> -radikoj	-	0	0	-	0	-	-	-	+	-	0	-	-	-	+	-	+	-	-	-	-	3
45. <i>x</i> anstataŭ <i>ks</i> kaj <i>kz</i>	-	0	-	-	+	-	-	+	+	-	+	-	-	+	+	-	0	-	-	-	+	7
46. <i>qu</i> anstataŭ <i>kv</i>	+	-	-	-	+	-	0	-	-	-	+	-	-	-	+	-	-	-	-	-	+	5
47. <i>c</i> al <i>ts</i> antaŭ <i>a</i> , <i>o</i> , <i>u</i>	-	-	+	-	0	+	-	-	-	0	-	0	-	-	+	-	-	-	-	-	-	3
48. permeso prononci <i>c</i> kiel <i>s</i>	-	-	-	-	0	-	+	-	-	-	0	0	-	-	+	+	+	-	-	-	-	4
49. Alves Pinto-alfabeto	-	+	-	-	0	-	-	-	0	-	0	0	-	-	-	-	0	-	-	0	-	1
50. tute nova planlingvo	-	0	-	-	+	+	-	-	-	-	0	-	-	0	-	-	-	+	-	-	-	3
<b>Membroj</b>	Alberg	Alves Pinto	De Clerck	Galindo	Goeres	Halvelik	Kelly	Martins	McCoy	Mirzahi	Navareño	Nobel	Riemersma	Ringh	Robertson	Ruiz Karell	Schumann	Stahl	V. van Themaat	Werdin	Wood	SUMO JESJOJ
+ = <i>jes</i>																						
- = <i>ne</i>																						
0 = <i>sindeteno</i>																						

*La jeno estas prenita el la unua ĉapitro de la verko "Traktaĵo pri internacia TERMINOLOGIKA ŜLOILO por sciencoj kaj teknikoj kaj ĝia apliko al NOVA PARADIGMO en lingviko" de Novomembro Manuel Halvelik. Mankas spaco por aperigi la tuton en NOVA PROVO, sed interesatoj povas akiri ekzempleron de la ampleksa verko ĉe la Libroservo de UEA kontraŭ 59,70 guldenoj, plus sendokosto kaj eventuala imposto.*

### *Enkonduko en la problemoj*

Apenaŭ iu kontestos ke aktuale la tuta mondo spertas grandan krizon. La fenomeno estas kwazaw labirinta teksaĵo, en kiu interplektiĝas kaj interkolizias multaj aspektoj kaj faktoroj: sociaj, naturaj, ekonomikaj, politikaj, sciencaj, teknologikaj, religiaj . . . Ĝi similas al decentrofugezo [centrifugilo] revolucanta ĉiam pli kaj pli rapide, tiele ke jam alproksimiĝas danĝera limrapido trans kiu la tuta maŝino minacas eksplodi. Kulturfilozofistoj [-filozofoj] tial ne hezitas diagnozi nian tempon kiel transiran fazon inter mortanta epoko malnova kaj naskiĝanta epoko nova. Sed, kompare al avanaĵ [antaŭaĵ] kultur-historikaj krizoj, hodiaŭ nepre ĉiuj civilcoj [civilizacioj] en la tuta mondo partoprenas en tiu procezo – ĉu mem produktante konfliktojn, ĉu trude ricevante ilin de ekstere – kiu elkreskas ĝis giganta kaj neniam avane vidita proporciego. Tiel giganta kaj potenca procezo ke la danĝero pri planede vasta memneniigo kaj/aw katastrofo iĝis tre reala.

Nu, mi ne apartenas al la kategorio de pesimismanoj, kiuj avandiras baldawan finon de la homaro aw eĉ apsulatan malaperon de ĉiuj vivantaĵoj. Plivole mi alprenas la starponton de optimismanoj kiuj male preferas serĉi vojojn kaj rimedojn por prepari novan epokon. Eĉ se devus okazi tria mondmilito aw planeda naturkataklismo, estas pli bone kaj kuraĝe partopreni en pozitivaj ideoj kaj movadoj, de kiuj eventuale povos profiti nia postularo, se ne jam ni mem.

Ja klare videblas, en la tuta krizo aw krizaro, ĝenerala subkurento kondukanta al vasta unuiĝado, spite la multnombrajn konfliktojn de opinioj kaj interesoj. La situacio, law mi, trafe kompareblas al la en termodinamiko bonkonata fenomeno pri transiro de unu materia organizofazo en alians pli superans. Egzemple, antaw ol produktiĝas ekstreme ordigita lasera faskopulso, ĉiuj elektronoj en koncerna "kanono" interpuŝiĝas aose kaj frenezege ĝis atingo de sojla energi-nivelo.

En la kultura kadro oni povas paroli pri revolucia disfalo de malnovaj paradigmoj, el kiu aperu nova paradigmo – en la senco kiun altributis [atribuis] al tiu ĉi koncepto la mejloŝtona verko *The Structure of Scientific Revolutions* fare de T. S. Kuhn (University of Chicago Press, USA, 1962).

Jam la nura teknologika progreso en komunikado kaj informado perforte trabečas ĉiujn eblajn barojn, naturajn kaj homfaritajn, kiuj ĝis antaw nelonge ancoraw distenis landojn kaj popolojn. La amaskomunikiloj portas iun ajn eventon fulmrapide de unu parto de nia terglobo al la alia, penetrante eĉ en la plej izolitans hejmon kaj influante ĉiun. En scienclistaj medioj tio kondukas al tia amasego da novaj nocioj, ke oni tutprave parolas pri "inform-eksplodo" tia ke eĉ katino plu ne retrovus siajn idojn en ĝi. Ankaw en la medio de lingviko.

Ja: novaj konceptoj estigas novajn vortojn! Ties ĉi lavango sekve komencas malesperigi terminologistojn kaj vortaristojn. Ĉiu nova vortaro, kaj des pli ĉiu enciklopedo, estas jam komplete eksmoda ĉe sia apero sur la merkato, tiele ke eldonistoj prave ekdubas ĉu entute la produktado de referaj *libroj*, law la malnova presa formo, ancoraw havas celon kaj sencan. Pli kaj pli lawtas voĉoj por transiro al pure komputora traktado. Sed jen aperas neatenditaj opstakloj.

Unue, la tempo de adaptiĝado pli kaj pli reduktiĝas. Por povi rapidigi la digestadon de nocioj, necesas jam nun tn. *sciobazoj kaj sciobankoj*. Bedawrinde, la instalado kaj la interligado de koncernaĵ aparataro kaj programaro ne progresas sufiĉe rapide, dum instruado de spertuloj por ilin priservi same postlamas la evoluon.

Due, reale efika pritraktado nepre postulas *tutmondan interligadon* inter sciobankoj, trans ĉiuj ŝtataj, kulturaj, kaj lingvaj limoj. Ja, la novaj konceptoj kaj ties envortigo venas el ĉiuj anguloj de nia globo, kwankam kompreneble superrege el la teknologike plej disvolvigitaj landoj.

Trie, la dawra disbranĉiĝado de sciencaj disciplinoj kaj teknikaj procedoj pli kaj pli fremdigas (izolas) ties aplikantojn, kaj sekve pli kaj pli malebligas plu-uzadon (reuzadon) de tawga termino en alia ol ĝia kutima medio, kreante kwantojn de fakte *nebezonaĵ synonimoj*.



Kware, la rapidega evoluo – lige kun ero tri – ne permesas sufiĉe klare kaj saĝe avanplani la probablan disvolviĝon de naciaj skemoj, tiele ke ankaw la koncerna terminfarado estiĝas [fariĝas] konfuza kaj kaprica, se ne diri komika. Malbeletan egzemplon liveras la preskaw nenidiraj nomoj donitaj kaj donataj al la kwanto da konstru-elementoj, kiujn povas enteni elektronika profesoro [proceziĵo]: *small scale integration* ( $10^1$ - $10^2$ ), *medium scale integration* ( $10^2$ - $10^3$ ), *large scale integration* ( $10^3$ - $10^5$ ), *very large scale integration* ( $10^5$ - $10^6$ ), *ultra large scale integration* ( $10^6$ - $10^7$ ), *hyper large scale integration* ( $10^7$ - $10^8$ ). Sekwos probable iaj *very hyper ultra super* . . . ?

Kwine, sed ne lastrange, sur la tutspeĉife lingva tereno oni spertas ke la gentaj lingvoj ne disponas sufiĉan *lingvan materialon* por alfronti tiun amas-atakon. Tiun ĉi opstaklon nur malmultaj terminologistoj kaj vortaristoj ĝis nun ŝajnas atenti aw konsideri, kwankam la lingvoj montras simptomojn pri emo al kolapso sub tiu invado. Dum la tempo por alsimiligado [asimilado] pli kaj pli ŝrumpas, ili akceptadas centojn kaj eĉ milojn da fremdvortoj, pruntitajn precipe el la vole-nevole kiel “internacia” akceptita usonangla lingvo . . . konsiderata ĝenerala tutmonda transportilo de sciencoj kaj teknikoj; ofte je kosto de propraj jam ekzistantaj esprimaĵoj. Ne mirige ke iuj “grandaj” lingvoj sarkasme eknomizis sin *franglais*, *Denglich*, *espingleś*, *inghiano*, kotopo.

Sed plej malsanas la angla lingvo mem, kiu terure ĵargonigas pro la aosa sciencoteknika “progreso”, ĝis eĉ elartikiĝo de la bazaj gramatikaj reguloj. Tion oni plu ne povas atributi al “sana natura evoluo”. Trafan diagnocon pri la malsano liveras egzemple la freŝadata vortaro pri siglonimoj [sigloj] (DNA, AIDS, LSD, FBI, ASCII, VHS, . . . ), kompilita de Rowley & Sheppard (*Acronyms, Initialisms and Abbreviations Dictionary*, Gale Research Co., Detroit, USA, 1984), kiu listigas ne malpli ol 300.000 tiajn mallongigojn! Kaj la kompilintoj esplice [eksplicite] avertas ke ili neniel alstrebis kompletecon. . . . Oni do bone komprenas la feblajn provetojn de fakuloj ie tie tamen havigi iun tujkompreneblan sencon al koncerna siglonimo, eĉ se tiu senco impresas tute artifika. . . . Jenan *internan* malfortecon de gentaj lingvoj fronte al la informeksplodo, mi ilustru per eldiro de profesoro H. Felber, la estinta direktoro de INFOTERM en Vieno –

organizaĵo fondita sub awspicoj de UNESCO, por internacie normizi la “faklingvon”:

Se ne povos realiĝi en la venontaj jardekoj, ke la rimedoj de terminfarado (terminologikaj principoj, metodoj, kaj enformigoj) estos tujplene aplikeblaj . . . tiam atendeble aperos gravaj malfacilaĵoj koncerne la prifakan komunikadon; eĉ *kompleta kolapso estas avanvidebla*. . . . La terura moviĝemo inter [ĝenerala] progreso kaj terminfarado ja staras en akra kontrasto kun la rigida stoko de vort-elementoj per kiuj la efektivaj terminoj povas esti muntataj. La radikoj, kiuj estas disponeblaj en la diversaj lingvoj, nombras apenaw kelkajn milojn, dum la kwanto da konataj konceptoj esprimatas per milionoj. La plafono por povi – en senerara maniero – atributi terminojn al ĉiuj konceptoj estas do baldaw atingota, se la ellaborado de terminoj devos plu evolui law la nuna procedado. [mia traduko]

Venante el la plumo de tia specialisto, la supra diagnozo apenaw kontesteblas. Kaj ĝiaj kunsekvoj [konsekvencoj] estas ege gravaj, kiel por gentaj lingvoj unuope, tiel por la internacia komunikado entute. Sekwe ankaw por . . . planlingvoj. (Fakte, terminologiko kaj interlingviko havas multon por diri unu al la alia.)

Mi do kuraĝas aserti, ke informado kaj interkompreniĝado sur alta sciencoteknika nivelo – ni diru “universitata nivelo” – baldaw plu ne eblos per iu ajn “natura” nacia lingvo – eĉ ne, kaj precipe ne, per la aosiĝanta angla lingvo. Oni fine plu ne scios, kion reale volas diri tiu aw alia kolego, pro tio ke li uzas (ankoraw) ne konatan terminon/koncepton, aw havigas al jes konata novan signifon devian. Komparu ni la situacion al aktuala trafiko en ĉiu ajn grandurbo. La senĉesa ĉiutaga aldonado de awtomobiloj ne nur polucas [polucias] la vivmedion, sed produktas ĉiam pli oftajn kaj pli longedawrajn ekhaltojn en la trafikfluo, ĝis kiam veturado tute simple strangolos sin mem. Anstatawigu awtojn per vortoj kaj urbojn per lingvoj; la lingva procezo evoluas samdirekte. . . . Oni tiel estas eniranta sakstraton, el kiu plu ne eblos eliro. Ĉiuj provoj eskapi la grandiĝantan premon per artifiko, kia estas perkompatora traktado, estas anticipe vokitaj fiaski en la fino. Analoge kiel eĉ la plej inĝeniaj kaj multekostaj rimedoj, por (re)efikigi urbotrafikon, montriĝas en reala praktiko tute vanaj.

Kion do jes fari?

Manuel Halvelik

*Personas pronomes:  
rektas, oblikvas kay posedas*

A) REKTAS PERSONAS PRONOMES

01) Mi	=	mi
02) Vi	=	vi [singular]
03) Li	=	li
04) Xi	=	ŝi
05) Qi	=	ĝi
06) Ni	=	ni
07) Zi	=	vi [plural]
08) Ili	=	ili [maskliw]
09) Ixi	=	ili [femaliw]
10) Xli	=	ili [duseqiw]
11) Iqi	=	ili [neseqiw]
12) Si	=	si
13) Oni	=	oni

B) OBLIKVAS PERSONAS PRONOMES

01) Min	=	min
02) Vin	=	vin [singular]
03) Lin	=	lin
04) Xin	=	ŝin
05) Qin	=	ĝin
06) Nin	=	nin
07) Zin	=	vin [plural]
08) Ilin	=	ilin [maskliw]
09) Ixin	=	ilin [femaliw]
10) Xlin	=	ilin [duseqiw]
11) Iqin	=	ilin [neseqiw]
12) Sin	=	sin
13) Onin	=	onin

C) POSEDAS PERSONAS PRONOMES

01) Mio(s)	=	mia(j)
02) Vio(s)	=	via(j) [singular]
03) Lio(s)	=	lia(j)
04) Xio(s)	=	ŝia(j)
05) Qio(s)	=	ĝia(j)
06) Nio(s)	=	nia(j)
07) Zio(s)	=	via(j) [plural]
08) Ilio(s)	=	ilia(j) [maskliw]
09) Ixio(s)	=	ilia(j) [femaliw]
10) Xlio(s)	=	ilia(j) [duseqiw]
11) Iqio(s)	=	ilia(j) [neseqiw]
12) Sio(s)	=	sia(j)
13) Onio(s)	=	onia(j)

EKZEMPLES:

- Mi vin aman. / Mi vin amas.
- Xi lin aman. / Ŝi lin amas.
- Xli aman unu ux alii. / Ili amas unu la alian.
- Ili han futbalistes. / Ili estas futbalistoj.
- Ixi han dancistines. / Ili estas dancistinoj.

- Petre sin vunden. / Petro sin vundis.
- Oni volan mone. / Oni volas monon.
- Mi alpaxen al la birdet, kay qi fudjen. / Mi alpaŝis al la birdeto, kaj ĝi fuĝis.
- La madre punon ilin. / La patrino punos ilin [la knabojn].
- La patre ixin bencan. / La patro ilin benas [la knabinojn].
- La vive favoren xlin. / La vivo favoris ilin [al viroj kaj virinoj].
- Xios hares han blondas. / Ŝiaj haroj estas blondaj.
- Lios brakes han muskolas. / Liaj brakoj estas muskolaj.
- Nios doms han qograndas. / Niaj domoj estas malgrandaj.
- Mi skriben law zios vortes. / Mi skribis laŭ viaj vortoj [de pli ol unu persono].
- La frizistin kombon ixios harobes. / La frizistino kombos iliajn hararojn [de virinoj].
- La barbir rason ilios barbes. / La barbiro razos iliajn barbojn [de viroj].
- Mi viden la hunde, kay qios hares hen longas. / Mi vidis la hundon, kaj ĝiaj haroj estis longaj.

**Itamar Alves Pinto**

Mi daŭrigas mian opinion pri plibonigo an E. La plibonigo forigu la konfuzon det E. kaj estu jena: prep. *an* anstatawu an prep. *de* 11 [numerita senco en PIV]; prep. *fa* anstatawu an prep. *de* 4, 10; prep. *des* anstatawu an prep. *de* 5, 6, 7; prep. *det* anstatawu an prep. *de* 3, 8, 12, 13; prep. *de* restu por prep. *de* 1, 2, 9.

Estas nepro alpreni an la prepozicioj *an* kaj *fa*. Prep. *de* restu por ablativa kazo. Prep. *des* estu por poseda kazo. Prep. *an* determinos akuzativan kazon. Prep. *fa* esprimos subjektan suplementon. Prep. *det* esprimos mezuran k.s. suplementojn.

An prep. *an* oni darfes apliki antaw aw post la artikolo *la*, ekz.: Mi sxatas legi an la PAGO, aw la an “PAGO”.

Prep. *an* estas utila por esprimi du objektojn, ekz.: Mi sxatas la legadon an libro kun neologismoj.

Prep. *an* estas tre necesa precipe en esprimado an neasimilitaj nomoj, ekz.: Li vizitis an Bordeaux. Li konas an Byron.

La prepozicion *an* oni povas uzi jene: Li instruas an E. La instruado an E. estas fa li. Li estas instruanta an E. Li estas la instruanto an E. Li estas instruisto an E.

Prep. *an* anstatawas *en ...n*, ekz.: Li iris an la cxambro. = Li iris en la cxambro. Li iris an hejmo. = Li iris hejmen.

Unua poemo kun la prep. *an*:

*Sekigxu fontoj  
en foraj montoj,  
sed fluu akvo  
an mia kuvo.*

Mi havas demandon, kial oni ne darfis diri jenan frazon: “Dio (la naturo, la meteo) kovris la teron per negxo.”

**Richard Stahl**

Ni ĉiuj konscias ke viva lingvo bezonas reformojn k ŝanĝojn. Ankaŭ ni konscias ke Esperanto devus esti pli facila k pli internacia. Ni multe dezirus ke ĉe ĉiuj internaciaj eventoj, Esperanto ĉeestas eĉ ĉe UNO.

Nu, mi proponas nur novan literon y kun la sono de la litero ĵ. Ankaŭ forigi la supersignon  $\hat{a}$  aŭ  $\tilde{a}$  k enmeti nur  $\acute{a}$ , kiu ja ĉeestas en skribmaŝinoj aŭ komputiloj.

Mi ankaŭ proponas forigi akuzativon k per simpla frazordo, post la verbo ĉiam, la persono, besto aŭ objekto kiu ricevas la agon de ĝi (verbo). Ekzemplo: Ne “mi manĝas panon” sed “mi manĝas pano”.

Rilate al adjektivo k substantivo, mi proponas ke ĉiam oni skribas unue la adjektivo k poste la substantivo. Ekzemplo: *granda hejmo*, ne alifforme.

Pri la problemo de la sono en la vortoj kiu komencas per *kv* aŭ *gv*, mi havas la sekvantan solvon: ne prononci *k* aŭ *g*, nek aliajn literojn.

Mia fina propono estas ke ni dejas porti la reformojn al ĉiuj geesperantistoj.

Por fini mian skribaĵon mi nur deziras peti al ĉiuj gereformantoj ke la interkonsento estas tre ege bezonata ĉe ni, la geesperantistoj de la mondo.

**Mario L. Ruiz Karell (Kubo)**

Planlingvo devas esti konstruita laŭ la jenaj principoj:

- 1) Konsisto de la vortoj el senŝanĝaj morfemoj kun fiksita signifoj, libere kombineblaj al vortoj, se la kombinaĵo nur havas senco;
- 2) Fonema ortografio kun la Latina alfabeto sen diakritaj signoj;
- 3) Elektro de la morfemoj ĉefe laŭ la principo de maksimuma internacieco.

**Willem Verloren van Themaat**

## FINANCA RAPORTO

Estas nun 75,26 nederlandaj guldenoj en la konto novo-x ĉe UEA (vidu NP 3, p.17). Kotizoj kaj aliaj pagoj sumiĝis je 512,10 guldenoj, dum estis elprenoj je 189,75 por afranko, 117,55 por fotokopiado, 56,74 por kovertoj kaj aliaj materialoj, kaj 72,80 por anoncetoj en la revuo *Esperanto*. Detala konteltiro haveblas laŭ peto.

### *esperanto reformenda*

tion ke esperanto estas ne plene ellaborita lingvo, scias pluraj homoj pli aŭ malpli profunde esplorintaj ĝian gramatikon. manko de pli detalaj reguloj kaŭzas, ke oni diference interpretas la fundamentajn regulojn, kutime bazante sian pravigon je propra denaska lingvo. tiu manko de principoj (mi ne mencias pli aŭ malpli personajn provojn de gramatikistoj, krei la regulojn je bazo de la uzata lingvo) kaŭzis aperon de multaj ne kompreneblaj aŭ diference komprenataj vortoj kaj esprimoj.

esperanto estas plene eŭropa lingvo, ĝi havas preskaŭ nenion pli komunan al ekz. aziaj lingvoj ol havas aliaj eŭropaj lingvoj. tial por parolantoj de eŭropaj lingvoj esperanto estas relative facile lernebla; por aliaj parolantoj ĝi estas malpli malfacila pro la reguleco kaj la vortafara sistemo.

esperanto ne plu estas senescepta lingvo, ĝia precipe parolata formo havas ne kalkuleblajn esprimojn, kiujn oni ne povas pravigi aŭ malpravigi laŭ la fundamentaj 15 principoj. tio ke plej multaj uzantoj de esperanto loĝas en eŭropo kaŭzis, ke kreitaj gramatikaj reguloj, vortradikoj, frazkonstruo kaj esprimoj estas facile kompreneblaj al parolantoj de eŭropaj lingvoj sed ne al aliaj homoj.

ne kalkuleblaj provoj reformi esperanton, por fari ĝin pli facile lernebla, pli logika, pli belsona, pli . . . ĝis nun ne rezultis, per iu ajn, bonigo de la situacio. reformi la lingvon estas necese, se ni volas pretendi, ke ĝi estas neŭtrala kaj internacie facile lernebla, sed la tuta reformemularo devas kunlabori proksime kaj bone reciproke informite. se ni ne faros tion, se ĉiu el ni klopodos mem solvi ĉiujn problemojn de esperanto, se ĉiu volos ĝismorte defendi siajn opiniojn pri gramatikeroj, ni povos nur revii pri efektivigo de vera reformo de la lingvo. *Novo* estas fajrero de espero aperinta en horizonto de mallumo en la reforma, ne

kunordigita movado. tial ni povas nun havi bazon por kunlaboro celanta pli bonan internacian lingvon.

estas tre grava demando – ĉu oni reformu la ekzistantan internacian lingvon aŭ kreu tute novan. mi persone opinias, ke pli ol cent jaroj de funkcia lingvo estas tute ne forĵetbla sperto kaj bazo, kiun ni ne rajtas ignori, se ni volas atingi tiom gravan celon. esperanto jam estas matura kaj nura materialo, kiun ni povos uzi, kiun ni devas bonigi. se ni provos komenci ion novan, ni bezonos sekvajn cent jarojn, por elprovi tion; do, ĉu valoras?

### kion fari

unue INTERNACIIGI (plej gravas). plej bone estus, se la reforman movadon partoprenu almenaŭ po tri lingvistoj, denaskaj parolantoj de ĉiu ekzistanta lingvo. tio estas praktike ne realigebla, sed ni devas celi maksimume internaciigi la reformemularon. se la reforman movadon partoprenos uzantoj de nur eŭropaj lingvoj, tiam iuj ajn komunaj decidoj estos ne tiom valoraj. neniuj rajtas ignori opiniojn de parolantoj de aliaj lingvoj. ni serĉu bonajn esperantoparolantojn de aliaj kulturoj.

due DIFINI. ni volas reformi esperanton, tial ni unue devas klare scii, kio estas farenda, ni devas trovi kaj difini ĉiujn ŝanĝeblajn aferojn de la ekzistanta lingvo. mi proponas, ke ekzistu datenbazo nomata “reformeblaj elementoj”. ĉiu persono montru reformendajn elementojn, tiel ni kreas kolekton, kaj ni scios, pri kio ni volas labori.

trie DISKUTI. sen famiĝemo, ofendiĝemo kaj aliaj malhelpaj sentoj aŭ emocioj, celante agordan realigon de nia komuna celo, ni diskutu skribe kaj laŭeble voĉe pri ĉiu el la difinitaj reformendaj elementoj. se ĉiu esprimos sian objektivan opinionon, tiam ni povos konkludi.

### miaj proponoj

mi scias, konas aŭ lernis sekvajn lingvojn: pola, esperanto, angla, ĉina, rusa, germana, franca, taja, itala, latina, japana kaj nepala. dum kelkaj jaroj mi instruis esperanton en pli ol dek kvin landoj al parolantoj de sume pli ol kvardek lingvoj, kaj mi spertis iliajn problemojn dum la lernado de esperanto. sur bazo de akiritaj spertoj mi esprimas mian opinionon pri kelkaj gramatikaĵoj de esperanto.

#### 1. SIMPLIGI LA PRONONCON

konsideru literojn simile sonantajn {i, j} kaj {c, ĉ, s, ŝ} kaj {z, ĝ, ĵ} kaj {r, l} kaj {u, ŭ}.

se vi povas korekte prononci ilin, vi apartenas al kompareble plej malgranda grupo de uzantoj de esperanto. mia sperto sendube kaj klare evidentigas, ke plej multaj homoj ne povas prononci ĉiujn suprajn sonojn. tial anstataŭ, ekz. *scii* oni aŭdas *ssii*, *ŝercas* – *ŝersas*, *ŝanĝi* – *ŝanĵi*, *neŭtrala* – *neutrala*, *liberala* – *riberala* ktp.

mi proponas forigi literojn ĉ, ŝ, ĵ, ĝ, kaj ŭ, r, aldoni literon y, kaj modifi ĉiujn vortojn, kiuj nun enhavas tiujn literojn. litero c estu prononcata kiel nuna ĉ, j estu prononcata kiel nuna ĝ aŭ ĵ, kaj y kiel nuna j. tiel la alfabeto estus 23litera, sed la prononca problemo malgrandiĝus ĝis preskaŭ ne ekzisto. tio postulus grandan reformon en la radikaro, sed oni devus ellabori principojn, kiel fari tion konsiderante maksimuman similecon de la malnovaj kaj novaj radikoj. la supraj vortoj tiam povus esti skribitaj, ekz. jene: *sii*, *seci*, *sanĵi*, *neutrala*, *libelala*. en ne malmultaj kazoj estus necese aldoni novajn radikojn, tiam ĝis nun neglektataj lingvoj (ekz. taja, ĉina, vjetnama) devus esti pli konsiderataj ol la eŭropaj.

#### 2. FORIGI LA SUPERSIGNOJN

tion mi aŭtomate faris supre. en nuna mondo, precipe telekomuniko, komputiloj, tajpiloj, supersignoj estas ne kontentige solvebla problemo.

#### 3. FORIGI LA

multaj lingvoj ne havas difinitan aŭ ne difinitan artiklojn, kaj nuna aoso pri ĝia uzado en esperanto plej bone pruvas, ke ĝi estas ne necesa, kvankam en maloftaj okazoj utila.

4. uzi majusklojn nur por specialaj celoj, ekz. emfazo, sed ne majuskligi komencan literon de frazo, nomo, pronomo. en multaj lingvoj oni ne faras tion, tio ŝajnas esti nur eŭropa kutimo, nur kutimo sen utilo.

5. nomoj monatoj, semajnotagoj estu ciferoj kun finaĵo, kio estas tre utila kaj facile lernebla, kion pruvas ekz. ĉina lingvo.

ju pli da bonaj sciintoj de esperanto partoprenos en la reforma movado, des pli da proponoj ni povos konsideri kaj pridiskuti, sed fine necesos organizi internacia(j)n konferenco(j)n, kun partopreno de centoj da lingvistoj, parolantoj de laŭeble plej multaj lingvoj, por decidi kaj ekrealigi. ni ne solaj laboru, ni kunlaboru. neniuj ĉion scias.

Joachim Werdin (Pollando)